
# Eŭropa Bulteno

Oktobro 2016, Numero 164

## EEU-KONFERENCO EN 2017



Pro la konstato ke la Eŭropaj Kongresoj organizataj de EEU montras daŭran tendenon al malpli da kongresanoj, la estraro de EEU taksis ke ankaŭ la venontan jaron, kiam devus okazi la 11-a EEU-kongreso ne estas ŝanco allogi sufiĉan kvanton da partoprenontoj kaj tial ĝi decidis estonte organizi Eŭropajn temkonferencojn. La unua tia Eŭropa Temkonferenco de EEU oakzos dum la Kongreso de Germana Esperanto-Asocio komence de junio 2017 en Freiburg (Suda Germanio) kun la temo „Zamenhof - pensulo kiu antaŭvidis homajn rajtojn“. Dum la konferenco, en kiu la partoprenantoj povos aŭskulti tri prelegojn pi la ĉeftemo, okazos ankaŭ asemblea kunsido de EEU en kiu oni elektos novan estraron kaj diskutos la perspektivojn de Esperanto en postbritelira EU. Kompreneble, la konferencanoj povos partopreni en ĉiuj programeroj de la GEA-kongreso.



Sekve, ni invitas ĉiujn interesitajn eŭropajn esperantistojn, plani partopreni en la Konferenco de la 2-a ĝis la 5-a de junio 2017. Pliajn detalojn pri la GEA-kongreso vi trovos ĉi tie: http://www.westermayer.de/manfred/GEK-2017_unua-bulteno.pdf

Zlatko Tišljar

# KIEL ESPERANTO POVUS GRAVE FORTIGI LA INFLUON DE EU EN ALIAJ MONDOPARTOJ

Eksterlanda ministro de Britio, Boris Johnson, en la konferenco de la Konservativa Partio la 2-an de oktobro 2016 finis sian paroladon per citaĵo de Winston Churchill, "Empires of the future are empires of the mind" (Imperioj de la estonteco estas imperioj de la menso). Tute antaŭ tio li parolis pri 'mola potenco' - do nemilita influo en la mondo - en la centro de kiu estas, li diris, la angla lingvo. Jen kompleta eldiro:



„Kaj temas pri mola potenco - vasta kaj subtila kaj ĉien ampleksanta brita influo ĉirkaŭ la mondo, per la lingvo, kiu estis inventita kaj perfektigita en tiu ĉi lando, kaj nun havas pli da parolantoj ol iu ajn alia lingvo sur la tero, kaj laŭ la golfetoj de ĉiu kontintento sur la Tero. Tien iras la mildaj pafilboatoj de la brita mola potenco kondukataj de Jeremy Clarkson - profeto pli honorigata eksterlande, bedauxrinde, ol en sia propra lando, aŭ de JK Rowling, kiu estas adorata de gejunuloj en iuj aziaj landoj kiel iaspeca diaĵo, aŭ BBC – senkonsidere pri tio kiom ajn furiozigaj kaj senhontaj iliaj ĵurnalistoj povas esti kontraŭ-Briteliraj, mi opinias, ke BBC estas la unuunura plej granda kaj plej efika ambasadoro por nia kulturo kaj niaj valoroj. Ekzemple Sergej Lavrov mem diris al mi, ke li ne nur spektis nian version de Milito kaj Paco, sed opinias ĝin "tre bone farita", kaj tio, el Kremlo, estas vera laŭdo."

(Originalo en la angla tekstas: And that is soft power – the vast and subtle and pervasive extension of British influence around the world that goes with having the language that was invented and perfected in this country and now has more speakers than any other language on Earth and up the creeks and inlets of every continent on Earth, there go the gentle kindly gunboats of British soft power captained by Jeremy Clarkson – a prophet more honoured abroad, alas, than in his own country, or JK Rowling who is worshipped by young people in some Asian countries as a kind of divinity, or just the BBC – and no matter how infuriating and shamelessly anti-Brexit they can sometimes be, I think the Beeb is the single greatest and most effective ambassador for our culture and our values. And it was Sergei lavrov himself who told me that he had not only watched our version of War and Peace, but thought it was "very well done" and that, from the Kremlin, was praise.)

Kaj tio ĝustas. Britio kun pravo kredas ke elirante el EU ĝi profitos pli per sia lingva imperiismo, vendante sian influon kaj la lingvon mem ankaŭ al EU pli multekoste ol dum sia membreco.

Kaj nun ni konsekvence pensu iom aliel. Se EU havus sian identecan lingvon kaj do ankaŭ komunikilon por interpopola uzo (23 oficialajn lingvon kaj unu neŭtralan laboran lingvon, kiu do estus nur eŭropa), ĝi same kiel Britio kaj Usono, povus esence vastigi sian „molan" influon al la resto de la mondo. Des pli, se tiu lingvo estus Esperanto – pro ties komenca grandega lernfacileco. Ĉar, konante eŭropan lingvon, kiun uzas 500 milionoj da eŭropanoj en ĉiuj sferoj de la vivo (scienco, tekniko, komerco…) ĉiu aziano, afrikano aŭ sudamerikano havus la saman utilon kiel uzante la anglan – ricevus la eblon de internacia komunikado, aliron al

scienca literaturo, al studoj en EU, al informoj el ekster siaj landoj, al komerco internacia, kontaktoj kun partneroj en produktosfero, al partneroj en internaciaj projektoj… Sed li havus plian avantaĝon, multe malpli da investita laboro por atingi tiun komunikilon, kaj verŝajne plimulto da azianoj por kiuj la angla estas enorme malfacila, transirus al tiu eŭropa lingvo kaj pro tio EU iĝus la plej influa en la mondo. Oni sendube kreŭs eŭropan informagentejon kaj multajn lernejojn por instru sian komunan lingvon al ne-eŭropanoj.

Por tion atingi sufiĉus nur kelkjara intensa laboro (maksimume 5 jarojn) por instrui ĉiujn eŭropanojn uzi Esperanton kaj traduki ĉiujn gravajn dokumentojn kaj fakan literaturon al Esperanto en elektronika formo kaj nur la plej necesajn ankaŭ en papera formo.

Zlatko Tišljar

# LUKSEMBURGA – ĈU LA 25-A OFICIALA LINGVO EN EU?

Vi povos legi la artikolon pri tio en la franca ĉi tie:
http://www.lessentiel.lu/fr/luxembourg/story/24361925
Reage al civitana peticio en Luksemburgio, kiun subskribis pli ol 14.000 loĝantoj de Luksemburgio, la registaro de Luksemburgio konsideras, ĉu ĝi prezentu al EU peton, ke la luksemburga fariĝu oficiala kaj labora lingvo de EU.

Tiu ĉi informo aperis mallonge post Eŭropa Tago de Lingvoj (la 26-an de septembro). Ĝi estas eble reago de loĝantoj de Luksemburgio al la Briteliro kaj identeca krizo en EU, pro kiuj multaj konsciiĝis, ke lingvo estas ĉefa portanto de identeco. Luksemburgio ĝis nun ne petis la EU-on pri oficiala statuso por sia oficiala/nacia lingvo (la luksemburga). Tiu ĉi konsiderata paŝo de Luksemburgia registatro eble rilatas al malferma diskuto pri la estonteco de EU/Europo. Pere de tiu ĉi paŝo Luksemburgio prezentus je la eŭropa nivelo ankaŭ portanton sia luksemburga identeco, sian nacian lingvon. Ĝis nun en Luksemburgio tiun ĉi rolon havis la franca kaj la germana. Simile, kiel estis ĝis 2007 reprezentita Irlando kaj ĝia identeco je la eŭropa nivelo pere de la angla.

Oni povas supozi, ke tiu ĉi decido de Luksemburgio povus kontribui al lanĉo de diskuto pri lingvaj kaj kulturaj problemoj en EU, kiu rekte koncernas civitanojn kadre de la komencita diskuto pri estonteco de EU/Eŭropo. EU membroŝtatoj devintus serĉi justan kaj efikan solvojn por ĉiuj EU-civitanoj. Solvo kiu ankaŭ kontribuus al konstruado kaj fortigo de komuna eŭropa konscio kaj identeco de ĉiuj EU-civitanoj. Ĝuste pri tiuj ĉi ideoj kaj proponoj informas „Nitra Deklaro“.

Laŭ mi, tiu ĉi decido de Luksemburgio povus instigi Hispanion por denove peti lingvan egalrajtecon por civitanoj kaj uzadon de lingvoj de regionoj de Hispanio: Katalunio, Eŭskio, Galicio, Valencio, pri kio ĝi petis en 2004, sed sukcesis nur parte. La regionaj lingvoj de Hispanio povas esti uzataj nur en Eŭropa Parlamento, sed kostojn por la interpretado devas kovri Hispanio. Hispanio povus starigi demandon pri lingva egalrajteco por siaj civitanoj en la regionoj, precipe post foriro de Britio kaj plua uzado de la angla, kiu devus perdi sian oficialan statuton en EU.

Jozefo Reinvart

# BJELOVAR AL TIBOR SEKELJ



Esperanto-societo de kroatia urbo Bjelovar okazigis jam la 4-an fojon manifestaĵon „Esperantistoj de Bjelovar dediĉe al sia urbo“. Ĉi-jare ĝi okazis de la 21-a ĝis la 23-a de oktobro. La programo estis vere riĉa kaj ĉiu povis ĝui almenaŭ parton de ĝi. Vendredo estis rezervita por malfermo de ekspozicioj de Željko Sachs (Filatelia ekspozicio pri Esperantaj poŝtmarkoj) kaj de Berislav Rubčić (Foto ekspozicio kun motivoj de floroj) en la urba biblioteko „Peter Preradović“. Sabaton estis organizita etnografia ekskuso al Magleneč kaj Veliko Trojstvo.

Dimanĉon okazis la centra programero de la aranĝo kiu estis ankaŭ plej vizitata kun partopreno de okdeko da vizitantoj el 5 landoj (krom Koratio, venis gastoj ankaŭ el Slovenio, Serbio, Hungario kaj Ĉinio). La ekspozicion dediĉitan al Tibor Sekelj sub la titolo „Manpleno da mondo“ malfermis en la Urba Muzeo Bjelovar la urbestro Antun Korušec per inspira parolado pri la urbo kaj kunlaboro kun esperantistoj . Antaŭ li parolis artgvidantoj de la Etnografia Muzeo en Senta (Vojvodino – Serbio) kaj de la Bjelovara Muzeo. La unuan fojon ekster la hejma muzeo en Senta, parto de eksponaĵoj kolektitaj de Tibor Sekelj en Aŭstralio kaj Novgvineo estis ekspoziciataj en alia urbo, alia lando. Temas pri etnografiaj objektoj kolektitaj dum lia ekspedicio al tiuj landoj en 1970. Estas nur eta parto de la kolekto donacita al la muzeo de Senta far Erzebeth Sekelj, edzino de Tibor. Sekvis prelegoj pri Tibor, monda vojaĝanto kaj vojaĝpriskriba aŭtoro, elstara reprezentanto de Esperanto-movado kaj muzeologo.



Zlatoje Martinov el Beograd parolis pri La poezio de Tibor Sekelj, Đorđe Dragojlović el Subotica parolis pi li kiel Nia nekonata korieo, Yu Jianchao el Ĉinio parolis pri Tibro Sekelj en Ĉinio kaj Juraj Bubalo el Zagreb pri Sekelj kiel multflanka vojaĝanto okaze de novaperinta libro de Sekelj en Esperanto „Papua Taglibro«. Sekvis prezento de la libro kiun al Esperanto tradukis Josip Pleadin. Prezentis ĝin Zdravko Seleš kaj Josip Pleadin.
Poste okazis konkurso pri recitado en kiu partoprenis gejunuloj el lernejoj kaj pliaĝuloj.
Fine okazis amikumado en la restoracio Golub kie oni proklamis la gajnintojn de la konkurso kaj estis prezentita poemkolekto Miniaturoj de Milica Ježovita el Križevci.
Finkonstate, temis pri tre agrabla renkontiĝo kun partopreno de esperantistoj el pluraj landoj kaj kun tre ekzempla prezento de esperantista agado al neesperantista publiko.

Anto Mlinar

# FAMA HISPANA ROK-ENSEMBLO PRIOMAĜAS ESPERANTON

Ili sin turnis al HEF. La knaboj de la rok-ensemblo *Cronómetrobudú* projektis nomi sian baldaŭ registrotan k-diskon –la sesan el ĉiuj KD-oj de ili produktitaj ĝis nun– *Esperanto*. Ili deziris prikanti la esperon. Kaj ili vidis en nia ideo la plej bonan manieron tion efektivigi. Ie tie ili do informiĝis pri nia lingvo kaj pri nia literaturo. Kaj trovis en la emblema E-poemo *Ho, mia kor'*, de Zamenhof, aperinta en ties *Unua Libro*, kiel ni ĉiuj scias, lirikaĵon plej taŭgan al ilia intenco, aperigindan en deklama formo en unu el la kantoj konsistigontaj la KD-on. Ili petis HEF-on pri deklamanto.



Kaj mi ricevis la proponon tion realigi. Mi devas konfesi, ke en la unua momento min ne tro entuziasmigis la ideo kunlabori kun dura-rok-uloj en registro de KD. Kiel sciate, muzike, miaj edukado kaj praktiko esence klasikas. Nuntempe mi tenoras ĉe la plektr-orkestro Calle del Barquillo. Sed, kiam mi telefone parolis kun la kantisto de la ensemblo, Javier Castro, ondo da simpatio min invadis. Aliflanke, ĝuste tiumomente mi ne liberis. Mi estis tuj vojaĝonta Andaluzien. Sed por Javier tio prezentis nenian problemon: "En ordo, telefonu al mi ĉe via reveno, ni prokrastos la registron", li diris akcepteme.

Kaj mi revenis kaj telefonis al li, kaj ni difinis rendevuon. Sekvatage Javier atendis min ĉe la elirejo de madrida metrostacio. Alta, kalva, kun *piercing*-oj, juna, kvankam ne tro... li, tamen, en konverso, ŝajnis al mi la antitezo de tio, kion oni atendas de tiuspeca dura-rok-ulo. Tenero kaj modesto konsistigis liajn plej karakterizajn trajtojn. Survoje al la studio, li rakontis al mi la celon de la kanto *Luna* [Luno]. Ĝian tekston li mem verkis; la muzikon komponis Óscar, la

violonisto de la bando. Por ĉi kanto la grupo pensis adekvata la enkondukon de voĉo en deklamo de la zamenhofa juveleto *Ho, mia kor'*. Ili volis ĉefe ĉi kanton kaj fakte la tutan k-diskon dediĉi al amikino, Lourdes (alnomata Lou), kiu venkis en sia batalo kontraŭ kanceron, perdinte la edzon pro ĝuste tiu malsano. Nekredeble! Mia animo vibradis kvazaŭ forprenita el mia korpo.

Ni alvenis al la studio, unu el la madridaj plejsanktejoj de la rokmuzikaj registradoj. Oni tie sonigis al mi la kanton *Luna*. Kaj ĝi tre pozitive impresis min, malgraŭ ĉiaj malgraŭoj: intence akrajn sonojn el la drumo kaj el elektraj gitaroj sekvis aliaj mildaj el violono kaj el la voĉo de Javier; aliflanke, la teksto montriĝis bela, jen dolĉa, jen amara, sed ĉiam tre zorgita, bonguste kaj lerte frapa:
*Sankta gravito, vi nin haltigas.*
*Sankta leĝero, vi nin sorigas.*
Entuziasmoplena, mi lokiĝis ĉe la registrobudo. Ricevinte la indikon "kiam vi volos", mi komencis deklami la zamenhofajn versojn penante laŭiĝi al la ritmo –al la spiritkapta ritmo– de tiu kanto sorĉa kaj magia. Tiumomente mi estis de ĝi tute ravita.
La rezulto kontentigis la teknikiston tiom, ke, liaaserte, ne necesis pliaj ripetoj. Li kaj Javier miris, ke por la unua fojo okazas tiaĵo. Mi, tamen, petis duan registron por poluri la prononcon de kelkaj literoj.




Nu, tio signis la komencon de bona –kaj mi esperas, ke daŭre fruktodona– amikeco inter mi kaj Javier aŭ, se tiel diri, inter Esperantujo kaj *Cronómetrobudú*.
Nelonge poste, Javier sendis al mi mp3-kopion de la registrita *Luna*, kun la peto, ke mi ne diskonigu ĝin ĝis la apero de la KD. Mi tion faris, sed jam de tiam mi komencis kolekti el la *budú*-anoj mem informojn pri la ensemblo por distrumpeti la novaĵon kaj prezenti ilin al la "verda publiko" en la oportuna momento. Kaj tial, ke la KD aperis la 24an de la pasinta aŭgusto, jen mi faras nun ilian prezenton laŭe al la sobra, konciza kaj rekta maniero, kiel ili deziras esti prezentataj en nia medio:
"*Cronómetrobudú* estas Burgos'a folklora metalrok-bando kun pli ol 15-jara muzika sperto. La originala maniero, kiel iliaj membroj kiel tuto frontas la muzikon, igas ilin bazi la sonoron de la ensemblo sur la energio aplikata al la gitaroj, la klasika muziko, la ĵazo, la flamenko, la muziko de Balkanoj... Ili eĉ kuraĝas kanti kanton tute en la japana".

Mi aldonu, ke, kadre de la metalroko, ili famas ne nur en Hispanio, sed, ankaŭ eksterlande, plej rimarkinde en Meksiko. En ilia oficiala retejo http://www.cronometrobudu.com/ abundas informoj pri ili, pri iliaj diskoj, pri iliaj tre oftaj koncertoj... Kaj en jutubo spekteblas multaj el

iliaj ludoj. Sed ĝuste en https://youtu.be/DkVMkTFGSQI aperas la tuta k-disko *Esperanto*. La sepa el la dekduo da kantoj tie aŭskulteblaj estas ĝuste *Luna*, en kies lasta parto aperas mia voĉo en deklamo de la zamenhofa *Ho, mia kor'*. Ĉi-reteje legeblas, krom diversaj informoj pri la KD, mia elhispanigo de la originala kantoteksto. Jen ĝi:

*LUNO (LOUNO)*
*Sidiĝu, rakontu al mi tion, lasu la sunon faldiĝi.*
*La stratoj nun dormadas, kaj neniu estas ĉirkaŭ ni.*
*Sidiĝu, rakontu al mi tion.*
*Ni ambaŭ scias, ke ĉi abismo, kiu ŝvebas super vi,*
*ne justas, ne.*
*Jes, mi scias, ne tre prudentas rideti tenante viajn manojn,*
*temas pri pura timo.*
*Jes, mi scias, estas senpripense voli haltigi la venton per la manoj,*
*sed kolero min forprenas.*
*Sankta gravito, vi nin haltigas.*
*Sankta leĝero, vi nin sorigas.*
*Sankta gravito, vi nin haltigas.*
*Sankta leĝero, vi iras kaj ne komprenas.*
*Dume la luno sin kombas en sia dormoĉambro, koketa ridadas,*
*sin sentas plej sola.*
*Kaj sube, surtere, la tristaj mortaloj plendadas pri ĉio,*
*estas povraj kruduloj.*
*Ĉu vi scias, Luno, ke ili celas nur trompi, sed ne kompreni, vin?*
*Ĉu vi scias, Luno, ke la plej kuraĝaj ja volas vin havi?*
*Vin havi, mia Louno, kiu prilumas miajn rozojn,*
*tiel bela, tiel linda, tiel sola.*

Ĉi-reteje, en la sekcio de kritikoj, abundas laŭdaj opinioj pri la KD *Esperanto*. Pluraj el ili estas esperantaj notoj el Svena Dun, Esperanto Viva, Asociación Cántabra de Esperanto ks, t.e, fakte, de unu sola homo atentema, zorgema, nelacigebla kaj admirinda: Miguel Gutiérrez Adúriz, kiu kutime multobligas sian voĉon i.a. favore al la bildo de ni projekciata ekstermovaden. Javier Castro sentis sin tre feliĉa el tio, ke "la esperantistoj reagis, cetere, tre pozitive!". Nu, vi ĉiuj vokatas fari tute certa tiun entuziasman aserton plej simple: aldonante al ĉi sekcio vian gratulon aŭ viajn vortojn de ĝojo pro la fakto, ke oni donis al la k-disko kaj al unu el ties kantoj la nomon *Esperanto* kaj elektis la poemon *Ho, mia kor'* kiel esencan parton de la kanto *Luna*. Temas ja pri apenaŭa peno, kiu, tamen, povas esti tre utila por firmigi la deziron de la *budú*-anoj plue kunlabori kun ni.

Same, vi ĉiuj vokatas al aĉeto de la k-disko *Esperanto*. Ĝi aĉeteblas i.a. en la sekcio Tienda (Butiko), de la oficiala retejo de la ensemblo [http://www.cronometrobudu.com/]. Cetere, endas instigi niajn libroservojn akiri ekzemplerojn de ĝi por faciligi ties distribuon en Esperantujo. Ni devas atesti pri nia ekzisto, pruvi al neesperantaj artistoj, ke estas inda kaj interesa artumi surbaze de niaj lingvo kaj kulturo, malgraŭ la modesteco de nia "verda mondeto". Ni ne devas fordormi ĉi-specajn okazojn. Ni esperantistoj pasigas duonon de nia vivo plendante, ke oficialaj instancoj, gravaj kulturhomoj kaj renomaj artistoj preteras nin, sed, kiam iu el ili turnas al ni sian atenton, ni ne malofte turnas al tiu la dorson. Ĉi-okaze ekzistas eblo de plia kunlaboro kun *Cronómetrobudú*. Javier Castro, la kantisto de la ensemblo, montris al mi simpation al la ideo iam kanti esperantajn tekstojn. Ni potencigu kaj firmigu tiun ideon.

Nun, en la monato septembro, *Cronómetrobudú* sukcese turneas en Meksiko prezentante la k-diskon *Esperanto*. En Hispanio, niaj metalrokuloj faros tiuspecan prezenton en du okazoj kaj en du urboj. Unue, la venontan 1an de oktobro, en la rokejo Hangar, de la urbo Burgos; due, la venontan 5an de novembro, en la rokejo Moby Dick, de Madrido. Ili invitis min partopreni ambaŭ prezentojn por deklami *Ho, mia kor'* kadre de la ludo de la kanto *Luna*. Plej volonte mi akceptis. Estos por mi vera plezuro kaj vera honoro tion fari. Kelkaj esperantistoj sciigis min pri sia intenco ĉeesti almenaŭ unu el la koncertoj. Bele, se multaj el vi imitos ilin! Bele, se du konsiderindaj "rondoj familiaj" kolektiĝos en Hangar kaj, respektive, en Moby Dick! Kiel ĝoje batos niaj koroj!

Miguel Fernández

# OSIEK – KONFERENCO EN OSIJEK (KROATIO)

De la 16-a ĝis la 22-a de julio oakzis en kroatia urbo Osijek Internacia Esperanto-Konferenco de la organizaĵo OSIEK, Partoprenis dudeko da esperantistoj el 7 landoj. La ĉeftemo estis „Landoj ĉe vojkruciĝo". La loka organizanto estis entrepreno Orbis Pictus, kiun gvidas Višnja Branković.




Kiel kutime, estis tre riĉa enhavo de la konferenco. Prelegis 6 prelegantoj: Višnja Branković, Zlatko Tišljar, Maria Butan, Georgij Mihalkov, Nedeljka Lozaić, kaj Spomenka Štimec. Krome okazis multaj ekskursoj kaj vizitoj al vidindaĵoj en Osijek kaj ĉirkaŭaĵo. Ankaŭ la organizo OSIEK havis sian ĉefkunvenon. Pli detale pri la programo vi trovos ĉi tie: http://www.esperanto.hr/agado_osiek_2015.htm. Mi mem prelegis pri „Kiel solvi la nunan eŭropan krizon?".

Zlatko Tišljar

# HEF-KONGRESO 2017

La estraro de Hispana Esperanto-Federacio decidis ke la 76 Hispana kongreso de Esperanto okazos inter la 23a kaj 25a de junio 2017 en la urbo Teruelo (Aragono). Ni plu informos pri aliaj detaloj en la venontaj semajnoj, sed rezervu jam la datojn!

José Antonio del Barrio

# EKSPOZICIO KAJ SIMPOZIO PRI ESPERANTO EN RUMANIO




Venredon, la 21-an de oktobro 2016 okazis en Galati (Rumanio), en la Muzeo de Historio, ekspozicio kaj simpozio pri Esperanto, kies afiŝojn vi povas vidi ĉi tie. La ĉefa merito en la organizado de tiuj eventoj iras al s-ro Neagu Doru de la Muzeo en Distrikto Olt en Slatina. La liston de la prelegantoj vi povas legi en la dekstra parto de la foto.

Jozefo E. Nagy


## Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.
Finredaktita: la 31-an de oktobro 2016
Redaktoro: Zlatko Tišljar
En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Jozefo Reinvart, Anto Mlinar, Miguel Fernández, José Antonio del Barrio, Jozefo E. Nagy

Kontakto: ztisljar (ĉe) gmail.com
Retpaĝo: http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno


Eŭropa Esperanto-Unio
Por efika kaj maldiskriminacia komunikado
www.europo.eu